

Honore al Kabe, 3-a parto :
Fundo de l' Mizero de Sieroszewski tradukita de Kabe
Radioprelego de Claude kaj Andrée Gacond, SRI 457, 1972.07.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj someraj elsendoj ni honoras la memoron de Kabe, unu el niaj ĉefaj tradukistoj. Kabe naskiĝis en Pollando en 1872, do ekzakte antaŭ cent jaroj.

A.- Hodiaŭ ni legos al vi erojn el la novelo *Fundo de l' mizero* de Sieroszewski, kiun Kabe tradukis el la pola en 1904.

Cl.- Ni estas en Siberio dumvintre. En « jurta » aŭ domaĉo forpelitaj gelepruloj ĝemas atendente la printempon, kiu ne venas. Mankas al ili nutro, kaj la vilaĝanoj, kiuj ilin forpelis, ilin pli kaj pli forgesas. Inter ili troviĝas sanuloj : Mergenj, kiun la edzo forpelis, ĉar al li ŝi ne naskis idojn. En tiu leprulejo ŝi ĵus naskis. Ŝi malamas siajn putrajn kunulojn kaj ŝtelas ilian lastan nutroprovizon. Kiam ŝi vere malsatos, ŝi manĝos sian idon. Inter la sanuloj ankaŭ estas Anka, kiu revenis vivi kun sia lepra edzo, kaj Biterhaj, knabineto, kiu naskiĝis tie kaj nenion posedas, ĉar al ŝi Mergenj ĉion ŝtelas. Jen kiel mortis la leprula Salban. Ni citas :

A.- « *Salban ne povis eĉ kuŝi, ĉar aperinta vundo okupis lian tutan dorson kaj ekstreme doloris lin, krom tio li havis putran manon. Li duone sidis sur la benko, apogante la nukon al ĝia dorso, kaj ĝemis pli kaj pli plende.*

Cl.- [*Lia edzino*] *Kutujahsit, kiu ne malpli suferis, leviĝis de tempo al tempo por doni al li akvon aŭ lavi liajn vundojn, ŝtopitajn per la malfluidiĝinta sango.*

A.- *Tiam la malsanulo silentis momenton aŭ murmuretis al la edzino vortojn de l' amo, kiel en iliaj junaj jaroj. [...]*

Cl.- *Longe ekregis silento, interrompata nur de la ĝemoj de Salban kaj de la ploro de l' etulo. Fine Salban eksilentis.*

A.- *He ! Fluo, leviĝu ! Salban mortis. Ĉu vi sentas la teruran malbonodoron en la jurta ?... Ĝi nin sufokos... oni devas elporti lin... – post momento kriis Mergenj.*

Cl.- *Neniu respondis. La ĉiam servema Fluo ŝajnigis la dormon aŭ eble efektive ne aŭdis : li ne moviĝis. Mergenj, kiu ĝis nun evitis ĉiun movon kaj eĉ ne leviĝis por ĵeti lignon en la fajron, tiuĉfoje elsaltis el sia angulo. Ŝi ekbruligis la fajron, aliris al Fluo kaj kaptis lian brakon.*

A.- *Leviĝu !*

Cl.- *Fluo kuŝis senmova.*

A.- *Efektive, ili mortis. Mi devos mem labori anstataŭ ĉi-tiuj sentaŭguloj ! La maljunulo tute infektos la aeron !...*

Cl.- *Ŝi deĵetis la vestojn kaj nuda, terura, kun malgrasaj pendantaj mamoj kaj kun malligitaj haroj, ŝi aliris al la mortinto, kiel ŝteliranta lupino. Ŝi rigardis lian vizaĝon kaj ektremis de abomeno, sed en ŝiaj okuloj tuj ekbrilis kolero kaj malamo.*

A.- Ankaŭ mi fariĝos tia !...

Cl.- *Ŝi depuŝis de l' benko la korpon per la piedo kaj penis eltiri ĝin el la jurta, sed la putraj membroj deŝiriĝis. Tiam ŝi elektis el la amaso da ligno du dikajn branĉojn kaj puŝis per ili la korpon, kiel balaĉon. Ŝi haltis ĉe la sojlo kaj ekŝanceliĝis de la terura malbonodoro, pelata de la vento en la jurtan. Ŝi aliris al la fajrujo, sidiĝis sur la cindro kaj varmigis la genuojn.*

A.- Fluo !..., Gregorio !... Malbenitaj putrujoj, ĉu vi ne leviĝos por elĵeti vian patron ?... Helpu, mi ne povos fari tion ; ĉu tio estas mia devo?...

Cl.- *Neniu respondis. La obstina virino kovris sian nazon kaj buŝon per tuko, kaptis la mortinton per ambaŭ manoj kaj komencis ruli ĝin trans la altan sojlon. Tio ne estis facila, la mola korpo glitis el ŝiaj manoj kaj alkroĉiĝis al la fosto.*

A.- Nun mi certe infektiĝos

Cl.- *pensis ŝi, sentante sur sia brusto la malsekan tuŝeton de l' mortinto. La malvarma aero, lumigita de la luno, ĉirkaŭis ŝin, kiel glacia akvofalo. Ŝi pene finis la malfacilan taskon, rapide fermis la pordon kaj revenis al la fajrujo. Ŝi tremis de ekscito kaj malvarmo, kiel tremolo skuata de ventego.*

A.- Mi devas min lavi, alie mi mortos de la solaodoro...

Cl.- *Ŝi fluidigis glacian en la kaldrono kaj lavis sin. Poste ŝi serĉis manĝaĵon en ĉiuj anguloj de l' jurta. La infano plende ploris. Ŝi rigardis la vestojn de Anka, elektis pli bonajn kaj vestis sin. En la ĉifonoj de Fluo ŝi trovis tranĉilon kaj ĝin prenis. Ĉe Gregorio ŝi staris momenton meditante, sed ne tuŝis lin. Ŝi revenis al la fajro, kiu preskaŭ estingiĝis kaj malforte briletis. La etulo ploris. La spirado de la dormantoj sonis en la anguloj de l' justa ; ŝajnis al Mergenj, ke ŝi aŭdas paŝadon. Ŝi malfermis la pordon kaj aŭskultis, sed aŭdis nenion.*

A.- La luno kaj neĝo brilis en silento. Post ŝi ploris la etulo, kaj ĉe ŝiaj piedoj kuŝis la abomena korpo de Salban. Ŝi revenis al la fajrujo kaj ekbruligis grandan fajron...

Cl.- *Ŝajnis al ŝi, ke ŝi vidas la malproksimajn jurta'jn, kie sataj homoj dormas en varmo, kie odoras vivo kaj sano.*

A.- Mi iros !

Cl.- *murmuretis ŝi.*

A.- Mi iros !... Ili mortigu min !...

Cl.- Ni citis el la novelo *Fundo de l' mizero* de Sieroszewski, kiun lerte esperantigis Kabe el la pola.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !